

*Jouko Lindstedt*

*(emeritiĝinta el / retired from)  
Universitato de Helsinko, Finnlando*

## Liberiĝi de interlingvistiko

**Resumo:** Esperantologio kutime estas prezentata kiel branĉo de interlingvistiko (aŭ planlingvistiko). Esperanto estas tamen escepta planlingvo, ĉar granda parto de ĝia nuna strukturo estas nek eksplicite planita nek planebla. Ĝi ne estus bona modelo por eventualaj novaj internaciaj helpilingvoj, kaj aliflanke ĝi havas malmultajn komunajn trajtojn kun lingvoj konstruitaj por artaj celoj. Pluraj gravaj esplortemoj pri Esperanto metodologie rilatas ne al interlingvistiko sed al aliaj branĉoj de lingvistiko kaj kulturaj studoj. Tiaj temoj estas ekzemple lingvokontaktoj kaj dulingveco, parta simileco inter Esperanto kaj kontaktolingvoj, denaskiĝo kaj spontanea lingvoŝanĝiĝo pro ĝi kaj sendepende de ĝi, parta simileco al minoritataj lingvoj, kaj la Esperanta lingvokomunumo kiel kulturkrea komunumo. Esperantologio tial ne plu estas branĉo de interlingvistiko. La strategio enkonduki Esperanton en la scian kaj universitan mondon sub la mantelo de interlingvistiko turnas la atenton de lingvistoj mise al ĝia artefarita komenco anstataŭ ĝia posta natura kaj kulturkrea evoluo, kiu estus science multe pli interesa. Interlingvistiko tamen restas unu el la subtenaj fakoj, kiujn esperantologio bezonas, same kiel ekzemple malgranda parto de anglistiko plu bezonas historian-komparan ĝermanistikon.

**Ŝlosilvortoj:** esperantologio; interlingvistiko; planlingvoj

### 1 Enkonduko

Esperantologio kutime estas prezentata kiel branĉo de interlingvistiko (aŭ planlingvistiko; Gobbo 2020 kaj Barandovská-Frank 2020 estas modernaj enkondukoj en la fakon, el du iom malsamaj anguloj). Ĉar Esperanto estas planlingvo, la ligoj inter la du fakoj estas evidentaj, kvankam la plimulto de la aktualaj esplortemoj de esperantologoj havas neniajn paralelaĵojn en aliaj planlingvoj. Ofte interlingvistiko estas uzata por pravigi esperantologion en sciencaj konferencoj aŭ universitataj programoj: por ke ni ne aspektu kiel partiecej esperantistoj, ni surmetas la mantelon de interlingvismo por montri, ke ni esploras pli ampleksan fenomenon ol la zamenhofan lingvon.

Ankaŭ interlingvistiko estas malmulte konata branĉo de lingvosciencoj, kaj dum ĝia relative mallonga historio ĝi ricevis plurajn difinojn, inter si

kontraŭdirajn (Gobbo 2023). Tio ne estas problemo en si mem: ankaŭ pluraj aliaj fakoj, ekzemple la esplorado de la piĝinaj kaj kreolaj lingvoj aŭ tiu de la gestolingvoj iam bezonis tempon por stabiliĝi kiel plenrajtaj lingvistikaj fakoj. Sed la interlingvistika aliro estas tamen malvasta kaj parte misgvida kadro por esplori kaj kompreni la plej sukcesan planlingvon, Esperanton. Ĝi turnas la rigardon de lingvistoj al malĝusta direkto. Kiam ni esperantologoj deziras turni la atenton al fenomenoj, kiuj proksimigas Esperanton al la tiel nomataj naturaj lingvoj, niaj studoj trafas la saman breton kun libroj pri Volapuko aŭ Klingono. Venis tempo demandi, ĉu nia interlingvistika mantelo pli ĝenas ol utilas.

## 2 Esperanto kiel escepta planlingvo

Esperanto estas unu el la internaciaj planlingvoj aŭ “artefaritaj helplingvoj” proponitaj dum la moderna epoko. Ĝi ne estis aparte sukcesa kiel “ĉies dua lingvo”, sed tamen senkompare pli ol ĉiuj ceteraj proponitaj helplingvoj, kiuj restas tre malmulte uzataj kaj tial vivas, se ili entute vivas, en komplete alispeca socia realo. Efektive, kiel atentigas Gobbo (2023, 104–106), kiam Otto Jespersen en 1931 vortumis la klasikan difinon de interlingvistiko kiel studo pri internaciaj helplingvoj, Esperanto estis jam praktike senrivala inter tiuj; Interlingvao estas la sola posta lingvoprojekto, kiu havis eĉ nur ioman sukceson, kaj ankaŭ de post ĝia apero pasis jam pli ol sep jardekoj.

Ĉefe pro la disvastiĝo de la angla kiel tutmonda internacia lingvo, la konstruado de novaj helplingvoj estas nuntempe aktiveco malofta kaj apenaŭ rimarkebla. Sed la eventualaj konstruantoj de novaj internaciaj lingvoj certe ne rigardus Esperanton kiel bonan modelon sed evitus plurajn el ties trajtoj, kiuj malfaciligas lernadon kaj ne estas sufiĉe internaciaj. Ekzemploj de tiaj malpli taŭgaj trajtoj en Esperanto estas la relative abunda konsonant-fonemaro, la akuzativo, la malpermeso de ergativaj verboj (t.e., deviga distingo inter *komenci* kaj *komenciĝi*), la difina artikolo, la nesimetrieco en la indiko de sekso, la ĝenerala eŭrocentrismo en la leksiko.

Unuflanke do Esperanto jam dum siaj unuaj jardekoj efike flankenpuŝis siajn rivalojn, aliflanke ĝi ne havas ian nekontesteble optimuman gramatikon, kiu estus la kaŭzo de ĝia relativa sukceso. Esperanto sukcesis pro kialoj nur parte strukturaj. Hazarde ĝi estis historie la unua planlingvo, kiu havis *sufiĉe* bonan strukturon por esti libere uzebla skribe kaj parole; por la plimulto de la homoj lernintaj Esperanton la sojlo transiri al alia lingvo estis poste tro alta, eĉ se tiu aŭ alia nova planlingvo promesus iom pli bonan strukturon. La plimulto de la parolantaro de Esperanto montriĝis ankaŭ tre konservema en lingvaj aferoj, eĉ pli konservema ol la singarde reformema

Zamenhof mem (pluraj ekzemploj troviĝas en Korĵenkov 2011), kio rapide stabiligis la lingvon. Fine, Esperanton fortigis la forta ligo kun ideoj kaj idealoj homaranaj kaj pacismaj (sed ne tiel ĝene forta, ke ĝi malhelpus esperantistojn subteni siajn proprajn naciŝtatojn en militoj, kiel ni denove vidas en nia tempo). Temas do pri pluraj historiaj koincidoj, kiuj ne tre multe rilatas al interlingvistika lingvoplanado.

Anstataŭ internaciaj helplingvoj, la plimulto de la nuntempe aktiva kaj videbla lingvoplanado direktiĝas al planlingvoj artcelaj, uzataj en fantastaj romanoj, filmoj kaj televidaj serioj. Fiedler kaj Brosch (2022, 31–32) ne inkluzivigas ilin en la kategorion de “planlingvoj”, dum Gobbo (2023, 119–120), male, starigas ĝuste ilin en la fokuson de la moderna interlingvistiko, esploranta ĉian konscian lingvokreadon. Ĉiuokaze, la nuntempa Esperanto ne havas multon komunan kun la novaj artcelaj planlingvoj (kvankam ĝi mem estis uzata por artismaj celoj en kelkaj malpli konataj verkoj, vidu Fiedler & Brosch 2022, 75–76).

Sed sendepende de tio, kiel estu difinitaj la limoj de interlingvistiko, la interlingvistika priskribo de Esperanto kiel planlingvo maskas la fakton, ke granda parto de Esperanto estas *neplanita*. La famaj 16 reguloj, la sola oficiala gramatiko de Esperanto, ne sufiĉas por produkti eĉ unusolan ĝustan frazon – ekzemple, ili diras nenion pri la vortordo. Por lerni Esperanton, oni devis ekde la komenco studi kaj imiti la tekstojn de Zamenhof (plej oficiale, la Ekzercaron) kaj poste tiujn de aliaj aŭtoroj. Ekde la komenco en Esperanto gravis implicitaj modeloj, ne nur eksplicitaj reguloj. Estas afero de difino, ĉu ekzemple la frazoj de la Ekzercaro reprezentas “lingvoplanadon”, sed ĉiuokaze, la plimulto de la lingvistoj verŝajne ne scias, ke Esperanto estas parte nekodigita – ke oni ne povas paroli kaj skribi bonan Esperanton, se oni neniam aŭdis konversaciojn nek legis tekstojn.

Granda parto de Esperanto estas ankaŭ *neplanebla*, ĉar fiksita per tradicio, kiel en la lingvoj neplanitaj. Ekzemple la sistemo de la Esperantaj landnomoj havas arbitrajn formajn distingojn, kiuj ne respondas al semantikaj distingo: la tipoj *svedo* – *Svedujo*, *belgo* – *Belgujo* kaj *finno* – *Finnlando*, *sviso* – *Svislando* diferencas de la tipo *Islando* – *islandano*, *Kanado* – *kanadano* nur forme, ĉar *svedo*, *finno* kaj *islandano* povas nomi etne apartajn gentojn, *belgo*, *sviso* kaj *kanadano* ne. Tamen la Akademio de Esperanto en la 10-a Oficiala Aldono (2023) oficialigis la tradician sistemon – io alia eĉ ne estus imagebla, malgraŭ iuj voĉoj eksterakademiaj postulantaj radikale reformi la sistemon.

Alia ekzemplo estas la nesimetrieco en la indikado de la seksoj en Esperanto. En la nuntempa mondo ĝi estas tre evidenta por novaj lingvolernantoj, malgraŭ la provoj de iuj esperantistoj (kiel Prytz 2023) parte forklarigi ĝin. Sed kvankam Esperanto estas planlingvo, la ebloj ŝanĝi ĝian strukturon tiurilate estas tre limigitaj (kp. Kramer 2021 pri parencovortoj). La plej trafa

ekzemplo estas, ke en Esperanto la nova seksneŭtrala triapersona pronomo *ri* restas ankoraŭ malmulte uzata kaj estas eĉ aktive kontraŭbatalata de multaj, dum en la sveda lingvo, kiu ja ne estas planlingvo, la nova artefarita neŭtrala pronomo *hen* estas akceptita en la ĝeneralan lingvouzon kaj kodigita en la normlingvo (Renström k.a. 2021). Sed kompreneble tiu ĉi ekzemplo povas parte speguli ankaŭ la sociajn sintenojn, kiuj eble ne estas samaj ĉe la mezuma esperantisto kaj la mezuma svedo.

En sia superrigardo pri la interrilito de esperantologio kaj aliaj fakoj, Fiedler (2023, 16) senrezerve konstatas, ke esperantologio estas parto de interlingvistiko, sed koncedas, ke ne ekzistas vere kompareblaj specialaj fakoj pri aliaj unuopaj planlingvoj. Tonkin (2022), starigante esplorajn prioritatojn por esperantologio, atentigas, ke la socilingvistikaj, etnografiaj, historiaj, literaturaj kaj aliaj temoj, kiujn esperantologio devas inkluzivi, estas jam ekster la tradicia temaro de interlingvistiko. Entute ŝajnas, ke interlingvistiko nek metodologie nek enhave havas multon por doni al la nuntempa esperantologio.

### 3 Unika lingvo, lingvistike normala

Esperanto estas unika fenomeno, ĉar ĝi estas konscie kreita planlingvo, kiu dum sia uzo akiris plurajn trajtojn de la tiel nomataj naturaj lingvoj. Ĝi kvazaŭ trairis lingvomortan procezon en inversa direkto. Sed, paradokse, ĝuste danke al tiu unikeco, oni povas kaj devas esplori ĝin per la normalaj kaj multe uzataj metodoj kreitaj por la studado de la naturaj lingvoj, kaj la esplorrezultoj povas esti interesaj por la ĝenerala studo de la fenomeno homa lingvo. Tial estas grave, ke ni ne prezentu Esperanton nur kiel unu el la planlingvoj inter multaj. La “interlingvistika mantelo”, kiun mi menciis ĉi-supre, povas unue aspekti bona maniero enkonduki (eĉ kontrabandi) Esperanton en la sciencan kaj universitan mondon, sed ĝi donas fine tute malĝustan referenckadron por ĝia studado. Flankenmeto de tiu mantelo povus rapidigi la poioman ĝeneralan akcepton de Esperanto kiel validan temon de lingvistiko – evoluo, de kiu Goodall (2023) vidas pozitivajn signojn.

Pereltsvaig (2017) prezentis bonan superrigardon de la ĝistiam lingvistika studado de Esperanto, ordigitan laŭ diversaj temoj kaj kun abunda bibliografio. Estas facile vidi, ke en iuj de la multaj sciencaj publikaĵoj cititaj de ŝi, aliaj planlingvoj ja povus roli kiel interesaj piednotoj, sed kiel tuto la kampo de lingvistika esperantologio estas sendependa de interlingvistiko. La monografio de Fiedler kaj Brosch (2022) estas nova kvalita paŝo antaŭen kaj definitive pravas, unuflanke, ke oni povas studi Esperanton laŭ pluraj

samaj aspektoj kiel lingvojn neplanitajn kaj, aliflanke, ke tio estas senchava kaj interesa ankaŭ por ĝenerala lingvistiko. Estas vere, ke ankaŭ ilia verko enhavas koncizan ĉapitron pri “planlingvoj kaj interlingvistiko”, sed evidente en ĝi temas nur pri strebo al kompleta pritrakto de la temo, ne pri prezentado de la pli vasta metodologia fono de iliaj studoj. Ĉiu medalo du flankojn posedas – oni povas demandi, ĉu tia ĉapitro eble nur fortigas la antaŭjuĝojn de iuj lingvistoj pri Esperanto.

Ĉi-sube mi mencias kelkajn esplortemojn, en kiuj esperantologio mia opinie povus atingi rezultojn gravajn por ĝenerala lingvistiko kaj kulturaj studoj, sed kiuj estas plejparte ekster interlingvistiko. La prezento estos konciza, kun malmultaj referencoj – pli ampleksan bibliografion oni povas serĉi en Pereltsvaig (2017) kaj, por parto de la temoj, en Fiedler kaj Brosch (2022).

*Lingvokontaktoj kaj dulingveco.* Esperanto estas ĉiam uzata en situacio de dulingveco kaj lingvokontakto. Iusence ĝi estas lingvo, en kiu la tuta leksiko estas pruntita, kaj en kies gramatiko, malgraŭ pluraj aprioraj eroj, la influo de aliaj lingvoj estas forta. La studo de lingvokontaktoj estas granda kaj dinamika branĉo de lingvistiko (vidu ekzemple Hickey red. 2020), kiu povas doni multajn ideojn al esperantologio kaj kiu povus mem riĉiĝi el ties rezultoj.

*Kontaktolingvoj.* Kontaktolingvoj estas novaj lingvoj naskitaj en kontakto inter du aŭ pli multaj lingvoj. Iliaj ĉefaj tipoj estas piĝinoj, kreolaj lingvoj kaj (kiel la plej malgranda grupo) mikslingvoj (Kouwenberg kaj Singler red. 2008). En sia enkonduko en interlingvistikon, Barandovská-Frank (2020, 63–79) dediĉas al ili tutan ĉapitron nomante ilin “naturaj interlingvoj”. Gobbo (2023, 108–109), male, emfazas la fundamentan diferencon inter la planlingvoj kaj la lingvoj piĝinaj kaj kreolaj, ĉar la ĉi-lastaj ja naskiĝis “pro spontanea lingvokontakto, sen ajna planado”. Mi mem (Lindstedt 2009) klopodis montri, ke estas fruktodone esplori la fruan evoluon de Esperanto kiel specon de orient-eŭropa kontaktolingvo, kvankam ĝi ne klare apartenas al iu el la tri ĉefaj specoj de tiaj lingvoj. Gobbo kompreneble pravas en tio, ke la konscie planita flanko de Esperanto ne konformas al la kadro de kontaktolingvaj studoj – sed el la esperantologia vidpunkto indas atentigi, ke en la ŝanĝiĝo de Esperanto okazis, aldone al preskribaj intervenoj, ankaŭ multaj nekonsciaj kaj spontaneaj procezoj (Fiedler kaj Brosch 2022, 335–349).

*Denaskiĝo kaj lingvoŝanĝiĝo.* Kiam piĝino ricevas komunumon de denaskaj parolantoj, ĝi laŭdifine fariĝas kreola lingvo, kaj ĝia gramatiko kaj cetera strukturo komencas riĉiĝi. Interesa demando estas, kiom tiuj strukturaj ŝanĝiĝoj okazas “en la cerbo”, danke al la genetike determinita lingvokapablo de la homo, kaj kiom “en la socio”, pro

la novaj komunikaj bezonoj kaj la pli vasta uzosfero de la lingvo kreoliĝanta. Esperanto estas interesa kazo: la ekzisto de la denaskaj parolantoj de Esperanto pravas, ke strukture ĝi ne fundamente diferencas de la naturaj lingvoj, sed tamen la spontaneaj ŝanĝiĝoj okazintaj en Esperanto estas kaŭzitaj ne de denaskiĝaj procezoj sed de la uzo de la lingvo inter parolantoj ne-denaskaj (Lindstedt 2006, 2016; Fiedler 2012). Esperanto do reliefigas la rolon de la “socio” kompare kun la “cerbo”: la Esperantaj denaskuloj ne ŝanĝis la lingvon, ĉar ili ne formis apartan parolkomunumon, sed la ne-denaska parolkomunumo de Esperanto sukcesis disvolvi lingvon, kiu senprobleme adaptiĝis al la natura lingvoakira procezo de infanoj.

*Minoritataj lingvoj.* La komunaj trajtoj inter Esperantujo kaj minoritataj lingvokomunumoj estas okulfrapaj (Wood 1979; Fettes 1996; Kimura 2010, 2012). Tiu simileco, kvankam nur parta, povas esti ĝena temo por la esperantistoj (escepte de iuj konvinkitaj raŭmistoj), ĉar ĝi ŝajnas kontraŭa al la principo universalisma celo de Esperanto – kaj same ĝena por la reprezentantoj de la minoritataj lingvogrupoj, kiuj eble ne ŝatus agnoski similecon kun la “artefarita” Esperanta lingvokomunumo, al kiu oni aliĝas libervole, ne pro sia etna deveno. La temo tamen meritis pli da socilingvistikaj studoj. Mi proponis la nocion *engrupa dua lingvo* (angle: *in-group second language*) por priskribi tiajn minoritatajn lingvojn, kiuj ne plu posedas unulingvajn denaskajn parolantojn kaj transvivas nur danke al konscia lingvolernado kaj lingvoplanado, kaj Esperanto tre similas al ili (Lindstedt 2016, 254, 256).

*Lingvokomunumo kiel kultura komunumo.* La Esperanta kulturo estas unika fenomeno kaj studi ĝian estiĝon – studi la estiĝon de Esperantujo kiel kultura komunumo – devas esti unu el la ĉefaj temoj de esperantologio (kp. ankaŭ Tonkin 2022). Jorge Camacho kritikis tian aliron: laŭ li “maleblus difini la Esperantan kulturon kiel apartan kulturon, ekzemple kiel la islandan aŭ tajvanajn kulturojn de antaŭ pluraj jarcentoj” (Camacho 2010, 524), kvankam li koncedas, ke eblas uzi la vorton “kulturo” metafore pri certaj trajtoj de nia komunumo. Tamen, eĉ nur parta simileco de du fenomenoj povas esti sufiĉa motivo por studi ilin per la samaj metodoj: Esperanto ne estas tipa kontaktolingvo, sed havas similecojn kun tiaj; Esperanto ne estas tipa minoritata lingvo, sed havas similecojn kun tiaj; kaj eĉ se Esperanto ne havus “veran” kulturon, la similecoj kun tia sufiĉus por fruktodone kompari. Sed ankaŭ en la studo de kulturoj ligitaj kun naciaj lingvoj iuj sciencistoj atentigas, ke kulturo ne estas io stabila, kion iu homgrupo posedas, sed io, kion oni konstante faras kaj refaras en la kruciĝo de diversaj intergrupaj influoj tra tempo kaj spaco (Puchner 2023). El tiu vidpunkto la kulturo de Esperantujo estas neniel speciala kazo.

Post la ĉi-supra listo de kelkaj promesplenaj esplortemoj, oni kompreneble ne rajtas ne mencii la tute kontraŭan konkludon de Ken Miner, profesia lingvisto scianta Esperanton. Li tezis, ke “esperantologio eblas, sed ne priesperanta lingvistiko” (Miner 2010, 259), ĉar Esperanto malhavas verajn denaskajn parolantojn vivantajn en sia propra lingvokomunumo – “indiĝenajn parolantojn”, laŭ lia termino – kaj tial ne eblas ricevi pri la gramatikeco de diversaj frazoj tiajn precizajn prijuĝojn, kiujn lingvisto bezonus por priskribi la lingvon. Ĉi tiu argumento ŝajnas kvazaŭ reĵeti esperantologion en la sinon de interlingvistiko, malproksimen de la studo de la naturaj lingvoj. Sed lia aliro baziĝas sur malvaste ĉomskia aliro al lingvistiko, kiu almenaŭ de la eŭropa vidpunkto aspektas iom paroĥisma. (Pri la sinteno de Chomsky mem al Esperanto, vidu Goodall 2023, 29–30, kaj ankaŭ Wunsch-Rolshoven 2018, 59.)

La lingvistoj esplorantaj naturajn etnolingvojn scias, ke la gramatikaj prijuĝoj de la “indiĝenaj parolantoj” ne ĉiam estas tiel egalaj kaj unusencaj, kiel la ĉomskia teorio premisas. Multaj regulecoj estas ne absolutaj sed statistikaj, malkovreblaj nur en tekstaj kaj parolaj korpusoj (kp. ankaŭ Kramer 2020). Krome, multaj minoritataj lingvoj, verŝajne la plimulto de ĉiuj lingvoj en la mondo, ne plu havas unulingvajn parolantojn plenkreskajn, sed estas konstante influataj de aliaj, pli grandaj lingvoj, kaj la limoj de la gramatikeco en ili povas esti tre svagaj. Tamen esplori ilin certe estas parto de lingvistiko – kaj eĉ urĝa tasko, pri kiu ne okupiĝas sufiĉe da lingvistoj. Ekzemple la 700-paĝa studo de Granqvist (2007) pri la fonologia kaj morfologia strukturoj de la finnlanda romaa lingvo estas grava kontribuo ne nur al la romaa lingvoscienco (vidu Matras 2002) sed ankaŭ al ĝenerala lingvistiko; tamen ĝi priskribas minacatan lingvovarian, en kiu ĉomskia lingvisto tuj renkontus svagajn gramatikajn prijuĝojn de parolantoj, similajn al tiuj priskribataj de Miner en Esperanto.

## 4 Komparo kun anglistiko

Malgraŭ ĉio prezentita ĉi-supre, restas tamen la fakto, ke Esperanto estas planlingvo kaj planlingvojn oni studas en interlingvistiko. Komparo kun anglistiko povas esti klariga ĉi tie. Kiom Esperanto estas planlingvo, tiom la angla estas ĝermana lingvo. La grandega plimulto de la sciencaj studoj pri la angla tamen tute ne bezonas ĝermanan historian lingvosciencan kiel sian kadron aŭ eĉ nur kiel sian fonon. Anglisto kutime ne bezonas sciojn pri la gota aŭ praaltgermana lingvoj; kaj same oni povas esplori la plimulton de la gravaj esperantologiaj temoj sen scii ion pri Volapuko aŭ Interlingvao – kvankam kompreneble por iuj specifaj esploroj pri frua Esperanto, scio de Volapuko ja povas esti necesa.

En la historia studo de la angla unu el la plej interesaj kaj malfacilaj demandoj estas la drasta ŝanĝiĝo de la angla lingvo, kompare kun aliaj ĝermanaj lingvoj: ĉu ĝin kaŭzis lingvokontaktoj, kaj se jes, precipe kiuj kontaktoj? La priskribo de la deira stato de tiuj ŝanĝiĝoj, la origina anglosaksa lingvo, ja estas temo de historia-kompara ĝermanistiko, same kiel la priskribo de la laboro de Zamenhof super diversaj versioj de la “lingvo internacia” postulas interlingvistikajn sciojn kiel sian historian kuntekston. Dum diversaj historiaj epokoj la anglan poste influis la lokaj keltaj lingvoj, la praskandinava de la vikingoj, la franca de la normandoj, iom ankaŭ la mezepoka Latino (Filppula 2013). La esplorado de tio, kiom ĉiu el ili influis la anglan kaj eventuale ŝanĝis ties gramatikon, ne plu rilatas al ĝenerala kompara ĝermanistiko. Plej gravas scioj pri tiuj aliaj lingvoj (precipe pri la kelta kaj praskandinava) kaj pri la sociologia pozicio de la angla dum diversaj historiaj epokoj. Same Esperanto, rapide forpuŝinte siajn rivalojn, ekiris laŭ sia propra trako kaj forlasis sian komencan planlingvan kuntekston.

Nuntempe unu el la centraj esplortemoj de anglistiko estas la disvastiĝo de la angla al novaj mondregionoj kaj novaj sociaj kunteksto, precipe ĝia uzo kiel tutmonda interlingvo (lingvafrankao) inter parolantoj ne-denaskaj. La angla komencis iom simili al Esperanto, kvankam ankaŭ la diferencoj estas kompreneble grandaj. La ŝanĝiĝo de la angla en siaj novaj roloj kaj ekzemple la naskiĝo de novaj anglabazaj kreolaj lingvoj ja postulas ankaŭ lingvohistoriajn studojn, sed ne historian ĝermanistikon.

La studo de la angla kaj aliaj modernaj lingvoj antaŭ longa tempo forlasis la jungramatikisman paradigmon, laŭ kiu scienca studo de lingvo ĉiam signifas historian studon (Paul 1920, § 10), la internaj ŝanĝiĝoj en lingvo estas multe pli gravaj ol kontaktaj influoj, kaj la historia-kompara metodo estas la definitiva pinto de lingvistiko. Interlingvistiko estas kvazaŭ la jungramatikismo de esperantologoj – kun la diferenco, ke interlingvistiko neniam atingis tian enhavan kaj metodologian unuecon kaj solidecon, kiel la jungramatikisma skolo (Gobbo 2023). Esperantologio povas nun senprobleme forlasi la interlingvistikan paradigmon en la granda plimulto de siaj temoj – kvankam ni kompreneble plu bezonos ankaŭ kelkajn interlingvistike orientitajn esperantologojn, same kiel iuj anglistoj plu bezonos okupiĝi pri la anglosaksa. Scienca fako neniam komplete elĉerpas siajn malnovajn temojn, sed ĝi konstante disvolvas novajn temojn kaj metodojn kaj ĝia tereno etendiĝas.



## 4 Konklude

Ni vidis, ke la plimulto de la gravaj esplortemoj pri Esperanto rilatas ne tiom al interlingvistiko, kiom senpere al aliaj branĉoj de lingvistiko kaj kulturaj studoj. La libro redaktita de Kiselman (2018), *Aliroj al Esperanto*, prezentas 14 diversajn alirojn, el kiuj nur du, tiuj de Blanke (2018) kaj Gobbo (2018), povas esti rigardataj kiel klare interlingvistikaj; mi supozas, ke tio povas servi kiel kruda pritakso de la relativa signifo de interlingvistiko por esperantologio. Esperantologio ne plu estas branĉo de interlingvistiko. La strategio enkonduki Esperanton en la sciencajn kaj universitatajn mondon sub la mantelo de interlingvistiko estas fine kontraŭefika, ĉar ĝi turnas la atenton al la artefarita komenco de Esperanto koste de ties posta natura kaj kulturkrea evoluo. Kompreneble interlingvistiko tamen restas unu el la subtenaj sciencaj fakoj, kiujn esperantologio bezonas, same kiel ekzemple anglistiko bezonas, inter multaj aliaj fakoj, historian-komparan ĝermanistikon.<sup>1</sup>

## Bibliografio

- Akademio de Esperanto. 2023. *Deka oficiala aldono al la Universala Vortaro*. <https://www.akademio-de-esperanto.org/decidoj/10oa.html> (28.02.2024)
- Barandovská-Frank, Věra. 2020. *Interlingvistiko: Enkonduko en la sciencon pri planlingvoj*. Poznań: Rys. (Interlingvistikaj Studoj, 1). [http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/Barandovska\\_Interlingvistiko\\_enkonduko.pdf](http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/Barandovska_Interlingvistiko_enkonduko.pdf) (28.02.2024).
- Bausani, Alessandro. 1970. *Geheim- und Universalsprachen: Entwicklung und Typologie*. Stuttgart: W. Kohlhammer.
- Blanke, Detlev. 2018. "Interlingvistika aliro." En *Aliroj al Esperanto*, redaktis Christer Kiselman, 25–51. Dobřichovice: Kava-Pech.
- Camacho, Jorge. 2010. "La Esperanta malpopolo." En *La arto labori kune: Festlibro por Humphrey Tonkin*, redaktis Detlev Blanke kaj Ulrich Lins, 521–528. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Fettes, Mark. 1996. "The Esperanto community: A quasi-ethnic linguistic minority?" *Language Problems and Language Planning* 20, kajero 1: 53–59.
- Fiedler, Sabine. 2012. "The Esperanto *denaskulo*: The status of the native

1 Ne nur esperantologio liberiĝas de interlingvistiko, sed estas observebla ankaŭ moviĝo de interlingvistiko for de sia tradicia forta ligo kun planitaj internaciaj lingvoj. Gobbo (2023) argumentas, ke interlingvistiko devas esti rekonstruita sur la bazo de la itala skolo de Bausani (1970) kaj pli videble inkluzivi ĉian konscian lingvokreadon, inkluzive de la artcelaj kaj fikciaj lingvoj.

- speaker of Esperanto within and beyond the planned language community." *Language Problems and Language Planning* 36, kajero 1: 69–84.
- Fiedler, Sabine. 2023. "Kiel Esperantologio kontribuas aŭ povas kontribui al aliaj fakoj." *Esperantologio / Esperanto Studies* 12 Nova Serio 4: 15–23. <https://doi.org/10.59718/ees35716> (28.02.2024).
- Fiedler, Sabine & Brosch, Cyril Robert. 2022. *Esperanto – Lingua Franca and Language Community*. Amsterdam/Philadelphia: John Benjamins. (Studies in World Language Problems, 10). <https://www.jbe-platform.com/content/books/9789027257536> (28.02.2024).
- Filppula, Markku. 2013. "Contact and the Early History of English." En *Handbook of Language Contact*, redaktis Raymond Hickey, 432–453. Chichester: Wiley-Blackwell.
- Gobbo, Federico. 2018. "Malantaŭ la kurteno: Esperanto kiel lingvoinventaĵo." En *Aliroj al Esperanto*, redaktis Christer Kiselman, 103–116. Dobřichovice: Kava-Pech.
- Gobbo, Federico. 2020. *Introduction to Interlinguistics*. Munich: Grin.
- Gobbo, Federico. 2023. "Ses difinoj serĉantaj fakon." *Beletra Almanako* 17, kajero 46: 100–123.
- Goodall, Grant. 2023. "Esperanto kaj lingvistiko: cent jaroj da (mal)amikeco." *Esperantologio / Esperanto Studies* 12 Nova Serio 4: 24–34. <https://doi.org/10.59718/ees43692> (28.02.2024).
- Granqvist, Kimmo. 2007. *Suomen romanin äänne- ja muotorakenne*. Helsinki: Suomen Itämainen Seura kaj Kotimaisten kielten tutkimuskeskus.
- Hickey, Raymond, red. 2020. *The Handbook of Language Contact*. 2-a eld. Hoboken, New Jersey: Wiley.
- Kimura, Goro Christoph. 2010. "La kornvala kaj Esperanto: entreprenoj similaj?" En *La arto labori kune: Festlibro por Humphrey Tonkin*, redaktis Detlev Blanke kaj Ulrich Lins, 171–177. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Kimura, Goro Christoph. 2012. "Esperanto and Minority Languages: a Sociolinguistic Comparison." *Language Problems and Language Planning* 36, kajero 2: 167–181.
- Kiselman, Christer Oscar, red. 2018. *Aliroj al Esperanto*. Dobřichovice: Kava-Pech.
- Korĵenkov, Aleksander. 2011. *Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof*. Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio. (Serio Scio, 8).
- Kouwenberg, Silvia kaj John Victor Singler, red. 2008. *The Handbook of Pidgin and Creole Studies*. Chichester: Wiley-Blackwell.
- Kramer, Markos. 2020. "Ĉu tamen eblas pri-Esperanta lingvoscienco? ... aŭ Kiel difini kiuj estas la kompetentaj parolantoj kiuj determinas la lingvan

- regularon?" *Esperantologio / Esperanto Studies* 9 Nova Serio 1: 13–26. <https://doi.org/10.59718/ees26987> (28.02.2024).
- Kramer, Markos. 2021. "Seksneŭtralaj parencovortoj – rezultoj de opinisondado." *Lingva Kritiko*, 06.01.2021. <https://lingvakritiko.com/2021/01/06/seksneutralaj-parencovortoj-rezultoj-de-opinisondado/> (28.02.2024).
- Lindstedt, Jouko. 2006. "Native Esperanto as a Test Case for Natural Language." *SKY Journal of Linguistics* 19: 47–55. [https://www.linguistics.fi/julkaisut/SKY2006\\_1/1FK60.1.5.LINDSTEDT.pdf](https://www.linguistics.fi/julkaisut/SKY2006_1/1FK60.1.5.LINDSTEDT.pdf) (28.02.2024).
- Lindstedt, Jouko. 2009. "Esperanto – an East European Contact Language?" En *Die Europäizität der Slawia oder die Slawizität Europas: Ein Beitrag der kultur- und sprachrelativistischen Linguistik*, redaktis Christian Voß kaj Alicja Nagórko, 125–134. München/Berlin: Otto Sagner. (Studies in language and culture in Central and Eastern Europe, 2). <https://helda.helsinki.fi/items/a0222d46-c006-40a3-b45a-1dbdbaa342b2> (28.02.2024).
- Lindstedt, Jouko. 2016. "Ĉu infana Esperanto estas natura Esperanto?" En *Serta gratulatoria in honorem Renato Corsetti*, redaktis Federico Gobbo, 250–258. New York: Mondial.
- Matras, Yaron. 2002. *Romani: A Linguistic Introduction*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Miner, Ken. 2010. "La neebleco de priesperanta lingvoscienco." En *La arto labori kune: Festlibro por Humphrey Tonkin*, redaktis Detlev Blanke kaj Ulrich Lins, 239–270. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Paul, Hermann. 1920. *Prinzipien der Sprachgeschichte*. 5-a eld. [1-a eld. 1880]. Halle: Niemeyer. <https://www.projekt-gutenberg.org/paulh/prinzip/paulvorr.html> (28.02.2024).
- Pereltsvaig, Asya. 2017. "Esperanto linguistics: State of the art." *Language Problems and Language Planning* 41, kajero 2: 168–191.
- Prytz, Otto. 2023. "Ĉu Esperanto, priskribita laŭ siaj propraj premisoj, estas seksisma lingvo?" *Esperantologio / Esperanto Studies* 12 Nova Serio 4: 90–99. <https://doi.org/10.59718/ees75986> (28.02.2024).
- Puchner, Martin. 2023. *Culture: The Story of Us, from Cave Art to K-pop*. New York/London: W. W. Norton.
- Renström, Emma A. kaj Anna Lindqvist kaj Maria Gustafsson Sendén. 2021. "The Multiple Meanings of the Gender-inclusive Pronoun hen: Predicting Attitudes and Use." *European Journal of Social Psychology* 52, kajero 1: 71–90. <https://onlinelibrary.wiley.com/doi/full/10.1002/ejsp.2816> (28.02.2024).
- Tonkin, Humphrey. 2022. "Esperanto: esploraj prioritatoj." *Esperantologio / Esperanto Studies* 11 Nova Serio 3: 86–107. <https://doi.org/10.59718/ees62843> (28.02.2024).

Wood, Richard. 1979. "A voluntary, non-ethnic, non-territorial speech community." En *Sociolinguistic studies in language contact: Method and cases*, redaktis William E. Mackey kaj Jacob Ornstein, 433–450. The Hague, Paris kaj New York: Mouton.

Wunsch-Rolshoven, Lu. 2018. "Noam Chomsky: 'Esperanto estas lingvo por denaskuloj'." *Esperanto* 111, kajero 3: 59.

## Pri la aŭtoro

Jouko Lindstedt (nask. 1955, esperantistiĝis 1969) estas emerita profesoro pri slava filologio en Universitato de Helsinko (1985–2020) kaj membro de Akademio de Esperanto (1998–2025). Li esploris la bulgaran, makedonan kaj slavonan lingvojn, la balkanan lingvoligon kaj la ŝanĝiĝon kaj denaskiĝon de Esperanto.

Retpoŝto: [jslindst@icloud.com](mailto:jslindst@icloud.com)

ORCID-numero: 0000-0001-9021-7622

## About the author

Jouko Lindstedt was born in 1955 and learnt Esperanto in 1969. He is a retired professor of Slavic Philology at the University of Helsinki (1985–2020) and a member of the Academy of Esperanto (1998–2025). He has researched Bulgarian, Macedonian and Old Church Slavonic, the Balkan Sprachbund, and change and nativization in Esperanto.

## Kirjoittajasta

Jouko Lindstedt (synt. 1955) oppi esperanton vuonna 1969. Hän on toiminut Helsingin yliopiston slaavilaisen filologian professorina 1985–2020 ja on Esperantoakatemian jäsen (1998–2025). Hän on tutkinut bulgariaa, makedoniaa ja muinaiskirkkoslaavia, Balkanin kieliliittoa sekä esperanton muutosta ja äidinkielistymistä.

## Breaking free from interlinguistics

**Abstract:** Esperanto studies are usually presented as a branch of interlinguistics (or study of planned languages). However, Esperanto is exceptional among planned languages because a significant part of its current structure is not explicitly planned nor plannable. Esperanto would not serve today as a good model for possible new international auxiliary lan-

guages; conversely, it shares only a few common features with languages constructed for artistic purposes. Several important research topics that are conducted as part of Esperanto studies are not related methodologically to interlinguistics, but rather to other branches of linguistic and cultural studies. Such topics include language contact and bilingualism, the partial similarity between Esperanto and contact languages, nativization and spontaneous language change due to – as well as independent of – nativization, partial similarity with minority languages, and the Esperanto language community as a culture-creating community. Consequently, Esperanto studies are no longer a branch of interlinguistics. The strategy of introducing Esperanto as a scholarly or academic topic under the cloak of interlinguistics wrongly turns linguists' attention to its artificial origins instead of its subsequent natural and culture-creating evolution, which would be of much greater scholarly interest. However, interlinguistics remains one of the supporting disciplines of Esperanto studies, just as a small part of English studies, for instance, still needs historical-comparative Germanic studies.

**Keywords:** Esperanto studies; interlinguistics; planned languages

### Vapaaksi interlingvistiikasta

**Tiivistelmä:** Esperantologian esitetään tavallisesti olevan interlingvistiikan (suunnitelmakielten tutkimuksen) haara. Esperanto on kuitenkin poikkeuksellinen suunnitelmakieli, sillä huomattava osa sen nykyisestä rakenteesta ei ole eksplisiittisesti suunniteltua eikä suunniteltavissa. Esperanto ei olisi hyvä malli mahdollisille uusille kansainvälisille apukielille, ja toisaalta sillä ei ole paljonkaan yhteistä taiteellisiin tarkoituksiin konstruoitujen kielten kanssa. Monet esperanton tutkimuksen tärkeät aiheet eivät liity interlingvistiikkaan vaan kielitieteen ja kulttuurintutkimuksen muihin aloihin. Tällaisia aiheita ovat kielikontaktit ja kaksikielisyys, esperanton ja kontaktikielten osittainen samankaltaisuus, äidinkielistyminen ja siitä johtuva ja siitä riippumaton spontaani kielenmuutos, osittainen samankaltaisuus vähemmistökielten kanssa sekä esperanton puheyhteisö kulttuuria luovana yhteisönä. Esperantologia ei siksi enää ole interlingvistiikan haara. Strategia, jossa esperanto tuodaan osaksi tieteen kenttää ja yliopisto-opetusta interlingvistiikan varjolla, kiinnittää kielentutkijoiden huomion virheellisesti esperanton keinotekoiseen alkuperään eikä sen myöhempään luonnolliseen ja kulttuuria luovaan kehitykseen, joka olisi tieteellisesti paljon kiinnostavampaa. Interlingvistiikka on kuitenkin yhä yksi esperantologian tarvitsemista aputieteistä, samaan tapaan kuin esimerkiksi pieni osa anglistiikkaa yhä tarvitsee historiallis-vertailevaa germanistiikkaa.

**Avainsanat:** esperantologia; interlingvistiikka; suunnitelmakielet